

Terminologia forumo (Vilno, 2005-07)

Pli ol 50 personoj atente sekvis la trihoran forumon dediĉitan al terminologiaj demandoj kaj direktatan de d-ro Detlev BLANKE. Kiel unua preleganto, inĝ. HORVÁTH Sándor informis pri siaj laboroj survoje al maŝinfaka vortaro. Li kiel bazon prenis la tiufakan Esperantan-germanan vortaron de Eugen WÜSTER, el la jaroj 1920-aj, ĝin enkomputiligis kaj ampleksigis per terminoj el aliaj fontoj, precipe PIV, konservante tamen la saman sistemon de referenconumeroj kaj ne enkondukante difinojn.

Poste, Ieva ŠVARCAITĖ, doktorino pri geografio, prezentis sian projekton de 11-lingva vortaro de geografiaj terminoj. Ĉiu termino estas provizita per difino kaj la tradukoj estas grupigitaj laŭ la lingvaj familioj. Demandite, ĉu ŝi trovis ĉiujn necesajn terminojn en antaŭaj verkoj, d-rino Švarcaitė indikis, ke ŝi devis krei plurajn kaj ĉi-okaze bazis sin sur la formoj de latinidaj lingvoj.

El la publiko venis atentigo, ke la Interreto tre helpas por trovi, ĉu difinita vorto havas la fakan uzon, kiun oni povas suspekti. Ekzemple, per *Tekstaro de Esperanto*¹ eblas trovi la uzokuntekston de serĉata vorto. Plie, ĉiuj kapvortoj de la unua PIV troviĝas en la reto kun la koncernaj fakindikoj². Iu atentigis ankaŭ pri tio, ke la reta katalogo *Trovanto*³ de la Aŭstria Nacia Biblioteko tre efikas por trovi spuron de malnovaj terminaroj, kies kopiojn eblas mendi. Ankaŭ la Biblioteko HODLER en la CO de UEA havas valoran kolekton da malnovaj terminaroj, same kopieblaj.

Por fini la unuan duonon de la forumo, Margaret CHALDECOTT prezentis kelkajn ekzemplojn de trikaĵoj laŭ diversdevenaj presitaj modeloj kaj indikis, ke por paroli pri ĉio ĉi sufiĉas malgranda faka vortprovizo, kiun ŝi jam kolektis cele al estonta traduko de triklibro.

Post meritita paŭzo d-ro Detlev BLANKE parolis pri Infoterm (la monde plej signifa centro pri terminologiaj aktivecoj, fondita de UNESKO laŭ instigo de la jam menciita Eugen WÜSTER), pri la evoluo de la Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC), kiu nun trovis novan respondeculon en la persono de Dirk Bindmann por sia TTT-ejo⁴, kaj pri diversaj terminologiaj avancoj en

¹ Serĉa servo, starigita de Bertilo WENNERGREN kaj baziĝanta sur korpuso de aŭtoritataj verkoj : <http://www.bertilow.com/tekstaro>. Komplemente al tio eblas serĉi vortojn ankaŭ per *Google* (<http://www.google.com>), kies korpuso estas multe pli granda, sed multe malpli aŭtoritata. Menciinda estas ankaŭ *Kukolo*, helpa fasado de *Google*: <http://tekstoj.nl/kukolo>.

² <http://perso.wanadoo.fr/kursoj/piv1/piv1.htm>. Simila paĝo ekzistas pri la dua eldono de PIV, sed la fontmaterialo estas bedaŭrinde malpli riĉa kaj ne posedas la fakindikojn.

³ <http://allegro.onb.ac.at/cgi-bin/allegro/maske.pl?db=esperanto&lang=esp>

⁴ <http://esperanto.net/tec>

Ĉeĥio, i.a. danke al la klopodoj de la eldonejo Kava-Pech kaj de inĝ. Jan WERNER.

Post tio prof. LI Kexi prelegis pri sia medicina Esperanto-angla-ĉina fakvortaro. Konstatinte, ke ĉ. 17000 internaciaj terminoj de tiu fako reduktiĝas al milo da etimologiaj elementoj, afiksecaj aŭ radikecaj, li konstruis sian vortaron vicigante la terminojn sub ilian ĉefan elementon. La angla-ĉina parto de tiu vortaro jam aperis en Ĉinio, sed malfacilas trovi eldoniston por la angla-Esperanta parto de ĉi tiu tre ampleksa verko. Ĉar tamen ĝi jam ekzistas komputilforme, estis proponite en la publiko, ke prof. LI eldonu ĝin sur lumdisko aŭ en la reto, kio estas ja ĉiam konsiderinda solvo por tiaj laboroj, sed havas ankaŭ malavantaĝojn por la aŭtoro.

Laste inĝ. Marc BAVANT, direktoro de la *Sekcio pri faka lingvo* de la Akademio de Esperanto, prezentis diversajn problemojn, ligitajn kun la fakvortoj⁵, laŭ tri vidpunktoj: unue la konstato pri ofta kunekzisto por la sama termino de unu formo fakeca ("internacia", "naturalisma"), kaj de unu formo nefakeca ("skemisma", "purisma"). Due la konstato, ke regas emo enkonduki en Esperanton sciencajn afiksojn kaj radikojn por iel enirigi la internaciajn latin-grekajn fakvortojn en la Esperantan muldilon, kun foje misaj kromefikoj. Trie li listigis kelkajn eblajn politikojn por integri la fakvortojn al la cetero de la lingvo kaj pledis por apartigado de la ebena de Esperanta vortfarado disde tiu de la etimologio, kiun tamen eblas vidi kiel sistemon de radikfarado, kun specifaj radik-elementoj, kiel tiuj montritaj en la medicina vortaro de prof. LI, kaj specifaj reguloj, malpli rigoraj ol tiuj de la Esperanta ebena. Konklude li esprimis deziron agigi la Akademion en la kampo de faka terminologio per disvolvo de kapabloj konsili aŭtorojn de fakvortaroj kaj deklari aprobon de iliaj verkoj laŭ terminologiaj kriterioj.

La planitaj tri horoj montriĝis nesufiĉaj por elĉerpi la temon, sed ĉiuj partoprenintoj kaj aliaj interesatoj estas bonvenaj daŭrigi la diskuton en la reta diskutrondo *terminologio*⁶.

⁵ Materialo el liaj lastatempaj prelegoj troveblas ĉe <http://perso.wanadoo.fr/kursoj/prelegoj>

⁶ <http://groups.yahoo.com/group/terminologio>